

Kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu
de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 646, 1976.02.25 & 28

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En sia argumentado favore al la enkonduko de esperanto en la programojn lerneajn la esperantistaro ĝenerale asertas, ke la instruado de la zamenhofa lingvo faciligos tiun de la gepatra lingvo. Sed bedaŭrinde ili ne kapablas diri, kial kaj kiel tio estas ebla. Ilia aserto restas plej ofte speco de slogano.

A.- Dum prelegaro ni provos konkrete demonstri, kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj.

Cl.- Ni unue prezentos manieron instrui esperanton, kiu samtempe profitas al la instruado de la franca ortografio kaj al la riĉigo de la vortaro.

A.- La ideala aĝo por komenci efikan esperanto-instruadon, kiu povas samtempe profiti al la lernigado de la franca lingvo, estas la naŭa jaraĝo. Tiam la infanoj ĝenerale frekventas la trian lernejjaron. Ilin karakterizas ripetmemoro, kiu favoras la asimiladon de la vortaro de fremda lingvo. Kaj ĝuste la esperanta vortformado havas specifajn kvalitojn, kiuj konkretigas la instruadon de la franclingva vortaro kaj de ties kompleksa ortografio kaj permesas ĝin individuigi.

Cl.- Helpe de fundamentaj vortlistoj, tiuj de **Albert Pirenne** kaj de **François Ters, Georges Mayer** kaj **Daniel Reichenbach**, estas eble akiri la franclingvan vortaron, kiun infano kapablas asimili je difinita aĝo. Tiun ĉi vortaron oni esperantigu kaj poste reduktu al fundamenta radikaro.

A.- Instruante tiun ĉi radikaron kaj la metodojn uzi la entenitajn finaĵaron kaj afiksaron, oni povas efike asimiligi la respondan francan vortaron, malkovrigante al la gelernantoj la signifajn rilatojn, kiuj ekzistas inter la vortoj.

Cl.- En esperanto oni ekzercas nur la aŭd- kaj leg-asimiladon kaj en la franca la transskribon. La kontrolo de la franca ortografio estas tre strikta ekde la unua leciono.

A.- Komence la instruado reduktiĝas al la lernado de la esperanta radikaro, unue helpe de bildoj, poste helpe de slipoj, kie la vortoj estas skribitaj. Tiu ĉi instruado estas ĝenerale kolektiva. Ankaŭ lingvolaboratoria ĝi povas esti. Ekzemple la naŭjaraj gelernantoj tiel lernas vortojn kiel mano, domo, la patro, la patrino, frato, fratino, besto, la tago, la nokto, labori, ami, granda, malgranda, alta, malalta, ktp.

Cl.- En dua laborfazo la gelernantoj ricevas slipojn, kie tiu ĉi vortaro estas skribita, kaj la francan tradukon oni petas. La ekzerco estas unue parola kaj kolektiva, sed baldaŭ ĝi povos fariĝi individua kaj lingvolaboratoria. Samtempe oni ekzercas la elparolon en esperanto kaj la skriban francigon, severe kontrolante ĉu la gelernantoj ekzakte ortografiis une main, une maison, le père, la mère, un frère, une sœur, un animal, le jour, la nuit, travailler, aimer, grand, petit, haut, bas, ktp. Lernanto ricevas novan slipon, nur kiam lia francigo estas ortografie senerara.

A.- Kun tria laborfazo komenciĝas pli kompleksaj ekzercoj pri la esperanta vortformado. Ĉiam per la traduko francen, unue parola kaj kolektiva, poste skriba kaj individua, oni samtempe riĉigas la franclingvan vortprovizon de la gelernantoj kaj severe kontrolas la akiron de la franclingva ortografio. Jen ekzerco farebla per la ĵus menciita vortlisto: Traduku francen: la granda frato laboras ; alta domo ; la patra domo ; doma besto ; la patrina amo ; nokta besto ; taga besto ; labora tago ; la mana laboro ; malgranda mano ; ktp.

Cl.- Per tiuj ĉi ekzercoj oni komprenigas al la gelernantoj la intervortajn rilatojn, okulfrapa fenomeno en esperanto, sed ne en la franca. Francigante la ricevitan slipon la gelernantoj scias, ke temas pri franclingva ortografiado. Okaze de ortografia dubo ili kutimiĝas konsulti francan vortaron. Jen la francigo de tiu ĉi ekzerco: le grand frère travaille ; une haute maison ; la maison paternelle ; un animal domestique ; l'amour maternel, un animal nocturne, un animal diurne, un jour ouvrable ; le travail manuel ; une petite main.

A.- Tiuj ĉi ekzercoj avantaĝe anstataŭas la famajn franclingvajn diktaĵojn. Ĉiu lernanto estas aktiva, antaŭeniras laŭ propra laborritmo; la instruisto ĉesas fariĝi diktilo kaj li havas multe pli da tempo individue okupiĝi pri la gelernantoj.

Cl.- Ni estas certaj, ke kiam oni science testos la rezultojn de tia instruado de la franca ortografio kaj vortlernado, oni tuj konstatos la superecon de la esperanta metodo super la klasikaj ĝisnunaj.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!